

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 25, 27. Marto 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Finlanda Parlamento por Esperanto.

Subvencio de 25000 fmk. al Esp. Asocio de Finnlando.

Jam en nia lasta numero ni havis — per la afableco de la redakcio de „Esperanta Finnlando“ — okazon mallonge raportii pri tiu unua vere grandega sukceso de niaj finnaj samideanoj. Ni kredas, kvankam nia loko estas sufiĉe malvasta, ke tiu venko valoras pli detalan pritrakton.

Kiel ni jam raportis en nia antaŭa numero, la Financa komisiono de la parlamento estis proponinta la nomitan subvencion, kaj en la presta skemo de budĝeto ĝi figuris nur kiel parto de kunmeta spezo „subvencioj al sciencaj, literaturaj kaj artaj societoj“, sume 1051900 fmk. Oni supozis pro tio, ke la parlamento tute ne atentis la internacilingvan demandojn. Sed okazis kontraŭe; el la tuta sumo de fmk. 3079500 destinata por la „subteno al scienco kaj arto“ (ne entenanta la regulajn elspezojn por instruado, altlernejoj, muzeoj ktp.) la resto de 25000 estis la objekto de ĉefa debato.

La diskuto estiĝis en la plenkunsido de la parlamento la 2-an de marto, okaze de la pridedico pri la ŝtata budĝeto de la nuna jaro, inter la 11-a kaj 12-a horo vespere, kaj nia afero venis tiel neatendite rapide en la tagordon, ke inter la publiko neniu esperantisto aŭskultis la interesan debaton.

Interesa ĝi vere estis, laŭ informo de la parlamentanoj. Ili ĉiuj estis elacigita kaj troteditaj de la ĉiamaj ciferoj kaj nombroj de la budĝeto. Pro tio la vigla debato pri internacia lingvo efikis tre refreŝige je la tuta parlamento, kiu kun atento kaj intereso aŭskultis la parolojn por kaj kontraŭ.

Jen mallongigita raportoj pri la tuta diskuto: Hildén (inĝeniero, socialdemokrato) eldiras ke laŭ opinio de kompetentuloj Ido estas filologie preferinda al Esperanto. Sed, ĉar diversaj opinioj ekzistas kaj la parlamentanoj ne povas certigi absolutan plibonecon de unu aŭ alia, estas plej bone subvencii ambaŭ. Li atentigas pri la opinio de la profesoroj-ekspertoj, ke la lingvoj tiel mal-

multe diferencas unu de alia, ke ili efektive ne konkuras, sed unu preparas vojon al alia. Laŭ lia opinio, subteni unu estas maljuste. Li proponas subvencion de 40000 fmk. dividotan duone inter ambaŭ.

Eklund (filozofia magistro, sveda) subtenas la proponon de Hildén.

Lumio (domadministranto, soc. dem.) esperas, ke ne regas la opinio, ke pluraj helplingvoj estas bezonaj. Se helplingvo estas necesa, kiel li opinias, kiel tia taŭgas Esperanto, kiu estas multe disvastigita. Ni trafos la celon per subvencio al Esperanto.

Ailio (filozofia doktoro, soc. dem.) La limoj lingvaj kaj klasaj ŝajnas ĉi tie tute miksiĝi. Mi opinias malsame ol Hildén aŭ Lumio. Efektive, la Financa komisiono devas esti ĉioscia, sed mi miras ĝian ĉiosciecon, kiam al ĝi ne estas kontentiga la opinio de la Kultura komisiono nek la rezervacio al tiu nek la ekspertizo, kiam ĝi memkonfide proklamas ke Esperanto estos la helplingvo kaj sekve nur ĝi estas subteninda. Mi ne kontraŭparolus la aferon, se Esperanto estus jam proklamita lingvo internacia, sed nun vekos nur ridon, se la parlamento akceptos la proponon de la Financa komisiono. Proponas rifuzon de la propono.

Liakka (fil. magistro, agrarano). La antaŭa parolinto eraras kiam li asertas, ke Finnlando estas la unua ŝtato subtenanta Esperanton. Verŝajne la afero progresas tro rapide por li. Ekzemple en Germanio Esperanto estas instruata en lernejoj. Efektive, jam ekzistas sufiĉa kaŭzo por subteni Esperanton. Sed senutile estus subteni du internaciajn lingvojn. Esperanto-Asocio de Finnlando jam ekzistas kaj laboradas kun bona sukceso havigante utilon al tiuj, kiuj lernas Esperanton. Nia subvencio estas nur agnosko de tiu grava kultura laboro, kaj tion ĝi meritas.

Hildén (vidu supre) komprenas la opinion de Lumio, kiu estas esperantisto, tiel ke li timas konkuron. Ni tion ne timas. Ni volas subvencion al ambaŭ por ke oni havu okazon konstati la plibonecon de unu el ili. Konfesas la kulturvaloron de Esperanto, sed Ido havus la saman, se ĝi kiel pli juna estus povinta ĝin jam atingi. Por ke ni vidu, kion Ido povas prestiĝi, ni subtenu ankaŭ ĝin. En Germanio ambaŭ estas subtenataj, en Svedio kaj Francio Ido estas instruata en popolaj lernejoj. Eĉ parto de la premio de Nobel estas donita al Ido pro ĝia teoria supereco. Ĉar ni ne povas scii, kiu el ili fine venkos, ni subvenciu ambaŭ.

Suolahti (profesoro de teŭtona filologio, nacia koalicio) diras, ke la demando estas tro vasta por detala pritrakto en tiel malfrua horo. Volas nur sciigi, ke li ne interesiĝas pri iu arto lingvo nek subtenas ilin. Ĉi tie oni havis okazon antaŭsententi la malkonkordon inter esperantistoj kaj idistoj. Per ŝtata subvencio al unuj aŭ aliaj ni naskos ĉi tie lingvan disputon pli akran ol ni ĝis nun spertis en Finnlando. Subtenas la proponon de Ailio pri rifuzo.

Alkio (literaturisto, agrarano) ne havas konfidon al la esperoj de arto lingvo. Tamen la demando de internacia lingvo estas sufiĉe grava por ke ni povu subteni la proponon de la komisiono. Estas devo de la parlamento fiksi opinion pri la afero por ne naski novan Babelon. Subtenas Esperanton, ĉar ĝi estas jam multe disvastigita.

Kokko (popolferneja instruisto, agrarano) ne kredas, ke artefarita lingvo povas atingi sufiĉan disvastigon, por fariĝi vere internacia. Li ne subtenas Idon, Esperanton nek Volapukon. Sed se oni volas doni subtenon, oni duontigi ĝin inter la du, por ke la pli forta havu okazon venki. Proponas subvencion de 25000 fmk. duonigotan inter esperantistoj kaj idistoj.

Esperanto en Sovjeta Ruslando.

(Fino.)

Ĝuste tie ĉi kuŝas radikoj de novaj ideoj en la regiono de la esperantismo sur la rusa tero. En Saratov naskiĝas tre originala formo de Esperanto movado, tiel nom. „torentismo“. Enhavante en si kelkajn elementojn de anarĥismo, la torentismo neas aŭtoritatecon, prezidantecon, regularojn, kotizojn ktp. Ĝi certigas, ke tio ĉi nur mal-simpligas la laboron, ligas manojn kaj devigas vane perdi tempon anstataŭ fari liberan kaj frukto-donan individuajn laboron. Kelkaj grupoj baziĝas sur tiuj ĉi principoj, interalie en Kamisĥin kaj Ĥarkov.

Alie disvolviĝas la movado inter la junularo, kondukanta je la fino de 1918 al la kreo de Tutrusa Ligo de Junaj Esperantistoj (T. L. J. E.) Komencas aperi la gazeteto „La Juna Mondo“. Dum certa tempo la junulara movado fariĝas la plej forta kaj unuigita el ĉiuj ceteraj Esperantaj flujoj. En Niznij-Novgorod, Tula, Vologda, Astrahan, Ribinsk, Velikije-Luki kaj en multaj aliaj lokoj la tuta vigla Esperanta laboro troviĝis precipe en la manoj de junularo. Entuziasmo, idealismo, ekflamiĝemo kaj neprofitemismo estas ĝiaj karakterizaj trajtoj. Kaj la laboro ekflamas je ĉia flamo, entuziasmige la maljunaj lacajn laborantojn.

Je tiu ĉi tempo — en novembro de 1918 — la Moskva Esperantistoj ricevas tutan donon en la kvartalo de Arbat, ricevanta la nomon „Domo de Esperanto“. Kaj tie ĉi laŭgrade — per la vojo de organizitaj kunvenoj, prelegoj kaj kursoj — la Esperanta propagando ricevas tute difinitan tendencojn. Komenciĝas tio, ke la estimata kamarado N. Evtiŝev, membro de Esperanta Akademio¹⁾, la lingvon Esperanto deklaras proletaria kaj en la spirito de revolucio-komunista mondkompreno aliformigas la tutan teorion de Esperantismo. Tiu ĉi nova tendenco havas, kompreneble, sukceson kaj elvokas polemikon en la sovjeta gazetaro kaj eĉ en Moskva „Izvestija“, kie la sufiĉe konata ĵurnalisto Kerjencev skribas pri tiu ĉi temo artikolojn. — En tiaj kondiĉoj en Popola Komisararo de

¹⁾ Interalie, de Evtiŝev antaŭ nelonge naskiĝis filo, nomita „Esperanto“.

Klerigo formiĝis, kun aktiva partopreno de Evtiŝev, komisiono pri la demando de la internacia lingvo, en kiun eniris, interalie, la prof. Brandt kaj la prof. Porjezinski, kaj ankaŭ kiel prezidanto de la komisiono la idisto L. Titov. Post la tuta vico da kunsidoj, fine, la 5. marto 1919 la komisiono unanime konstatas, ke nur la lingvo Esperanto povas esti konsiderata dum la esplorado de la demando pri la enkonduko de la studado de lingvo internacia en lernejoj. Dum la kunsido de 14. aprilo 1919 kaŭze de la datreveno de la morto de d-ro L. Zamenhof, okazinta en Moskva Politehnika Muzeo kun partopreno, interalie, de Gorbunov-Posadov, Tregubov k. a., la idisto Titov denove eniras en la esperantistan familion. La cirkonstancoj ordiĝas trege favore. Sed... la proletaria direkto de la nova laboro montriĝas, videble, nekonvena al la malnovaj esperantistoj, la junularo disŝutiĝas sur disvojo, sed ankaŭ la novaj fideluloj en pli bona okazo deflankiĝas de Esperanto en la politikan laboron. En rezulto tio haltas sur duonvojo kaj la plej oportuna momento forvapiĝas el la nazo.

Iom post iom, kaŭze de la ordigintaj cirkonstancoj Moskva „Domo de Esperanto“ malpleniĝas, kio tre rapide, kaj ne pli malfrue ol en printempo de 1920 alkondukas ĝin al vera katastrofo (ĝia likvido), sed al tio aliĝas ankoraŭ aliaj kaŭzoj. Ankoraŭ antaŭ ĝia falo, la politiko de „Domo de Esperanto“ estas kritikata el ĉiuj flankoj. Al ĝia teatreca kaj senfrukta laboro, oni kontraŭstarigas la laboron de Petrograda Societo „Espero“ kun ĝiaj presataj „Cirkulaj Informoj“, kun ĝia eksterordinare konscience funkcianta „Informa Oficejo“ kaj, fine, granda eldonejo. La profunda konscio de graveco de la afero plene respondis al la solida kaj sistema laboro. Petrograda Societo „Espero“ ankaŭ nun restas sur la supro de sia stato, kaj tie ĉi specialan meriton oni devas aljuĝi al ĝia prezidanto Drezin, Pilev, Soroko k. a.

Dum tiu ĉi tuta tempo ne ĉesas la profunda interna laboro, kaj grandan puŝon donas al ĝi la fondo laŭ la iniciato de N. Jeltov kaj V. Polakov la 1. julio de 1919 de Rusa Sekcio de Esperanta Literatura Asocio (ELA), large disvolviĝinta kaj

kolektinta riĉan materialon por la estonta eldonado. Rusan sekcion de ELA oni devas konfesi kiel unu el la plej gravaj rusaj Esperantaj organizaĵoj.

Fino de la sama 1919 jaro distingiĝis per nova fakto. En novembro en la urbo Samara publikiga Deklaracio pri Esperanta Sekcio de III-a Internacio, kaj same en Samara sub la prezidantecon de Ort-Sunnam formiĝas Provizora Centra Komitato de Tutrusa Esp. Federacio kaj estas komencon la laboron por kreo de Tutrusa Esp. Centro. La subita morto de ĝia unua prezidanto N. Jeltov, okazinta pro tifo la 9-an de majo 1920, kaj ankaŭ la okazinta konflikto kun „Domo de Esperanto“ kaj devenintaj pro tio ĉi malkomprenoj rimarkeble malfortigas la laboron de tiu ĉi nova organizaĵo.

Rezulte, en la mezo de 1920 jaro, je la monato aŭgusto, oni ne povus nomi formiĝinta la ĝeneralan stafon de la Esperanta movado en Rusujo, malgraŭ la multeco de kursoj, monhelpoj al multaj Esperantaj organizaĵoj ktp. Karakterizaj estas la zorgoplenaj serĉadoj de formo kaj flanko ideo, sen kiuj Esperanto per si mem prezentiĝas por multaj nur kiel rimedo, sed ne kiel memstara celo. Tamen kune kun tio ĉi Esperanto en ĉiuj siaj transformiĝoj montriĝas egale viveca. Oni povas tamen facile antaŭvidi, ke ĉio estas nur antaŭludo antaŭ la ankoraŭ ne vidita disfloro.

Tia, ĝenerale, estas la esenco de la Esperanta movado en Rusujo, kia ĝi estis ĝis septembro 1920. La Sovjeta estraro ankoraŭ ne enkondukis Esperanton en lernejojn, la rusaj esperantistoj ankoraŭ ne kreis sian centron, Esperanto ankoraŭ ne estas konfirmata en siaj rajtoj. Ŝajnus, ke nenio ankoraŭ estas atingita, esence dirante. Sed kune kun tio ĉi — ĉe preskaŭ plena foresto de literaturo kaj lerniloj, ĉe eksterordinare malfacilaj kondiĉoj de vivo — Esperanto nun en Rusujo staras sur multe pli firma grundo ol antaŭe.

Esperanto vivas per sia interna forto kaj siaj neelĉerpeblaj fontoj.

Strzalkova Militkaptitejo (Pol.), 12. febr. 1920.

El la rusa lingvo esperantigis
A. Oberrotman, del. U.S.A.

Laherma (fil. mag., soc. dem.) gratulas finnan nacion pri la nova koalicio Suolahti-Ailio, nun kiam la konservema koalicio registaro estas falonta. Sed oni devas memori, ke la nomitaj sinjoroj posedas plurajn kulturlingvojn kaj do ne bezonas helplingvon. Tute alia estas la afero ĉe sciaviddaj laboristoj. Inter ili Esperanto disvastigas forte. Mi ne konas unu nek alian. Sed oni devas subteni kaj ne sukofiki florantan intereson kaj agemon. Subtenas la hodiaŭ multe klačitan Esperanton.

Schauman (fil. dro., sveda maldekstro) subtenas Suolahti jam por formalaj kaŭzoj, ĉar oni ne povas nomi Esperanton aŭ lido-societon scienca aŭ literatura. Ĝi estas pleje paralela al stenografista societo. Se la ŝtato volus subteni, tio devus okazi en alia kunteksto.

Soininen (profesoro, ĉefdirektoro de la administracio por publika instruado, progresema) ne volas enmiksiĝi en la disputon pri Esperanto kaj lido. Sed ĉar oni proponis de diversaj partoj rifuzon de la subvencio, li volas tion varme kontraŭstari. Se la praktika utilo havigebla por unu aŭ alia estus nur en estonteco, li konsiderus tro frue subvencii la movadon. Sed Esperanto estas jam tiel disvastigita, ke ĝi povas efike servi kaj servis en la kampoj de komercio, turismo, eĉ jam ĉe sciencaj kongresoj. Antaŭgatis pri tio, ke Esperanto estas instruata en lernejoj de la grandaj kulturnacioj, eĉ en Britio, ke ĉe la konferenco de la Ligo de Nacioj la reprezentantoj de 11 ŝtatoj proponis akcepton de Esperanto. Kvanke la afero estas prokrastita, tute ne estas neeble, ke Esperanto fariĝos unu el la oficialaj lingvoj. Estas jam sufiĉa kaŭzo subteni Esperanton movadon.

Vuolijoki (fil. mag., soc. dem.) esprimas la opinion, ke nek Esperanto nek lido fariĝos la internacia lingvo. La afero estos privedicdata en ia interparlamentara konferenco, simile kiel ekz. la unuoj de elektro. Sed la parlamento prenas la tutan aferon tro mals serioze, pluraj deputatoj ŝajnas ridetadi. Kaj tamen la valoro de la afero estas grandioza. Antaŭ ĉio, ĉar ĝi estas demokrata ideo. La helplingvo estos tiel facila, ke oni povos ĝin instrui en popolaj lernejoj, kaj la lernantoj ricevos kapablon ĝin uzi. Cetere, estas fenomeno, ke inter la deputitoj ĉe la Ligo de Nacioj estis tiel multaj subtenantoj de Esperanto. La samon li speritis en socialista konferenco en Bern, kie francoj kaj angloj kune proponis akceladon de internacia helplingvo. Parolas pri fanatikeco de esperantistoj kaj idistoj. Opinias, ke ne estas juste subteni nur unu el ili.

Arajärvi (bankdirektoro, nacia koalicio) opinias, ke estas damaĝe faciligi eksterlandajn vojaĝojn, kiuj jam nun konsumas tro multe da mono. Subtenas la rifuzon.

La prezidanto deklaras, ke la propono de Kokko ne estis subtenata kaj pro tio falas; ekzistas do krom la propono de la Financa komisiono la propono de Hildén pri 40,000 marka subvencio duonigota inter esperantistoj kaj idistoj, kaj la propono de Ailio pri rifuzo de la subvencio.

La propono de Hildén estas malaprobata per aklamado.

La propono de Ailio estas forjetata per 86 voĉoj kontraŭ 74.

La propono de la Financa komisiono estas aprokata.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 8-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (18-a daŭrigo.)

Poste Mateo songis, ke iu staras super li, iu grandega, senvizaĝa, kvazaŭ nehoma, staras kaj krias, simile al oceano, kiu antaŭ nelonge same kriadis en liajn orelojn dum la nokta ventego:

„Malsaĝaj homoj, mizeraj, nekleraj homoj! Ne ekzistas en la mondo tia vilaĝo, ne ekzistas tia vilaĝanoj, nek tiaj sinjoroj, aŭ tiaj skribistoj. La kampo ĉi tie estas alia kaj ĝi kreskigas alian grenon, kaj aliaj ankaŭ estas la homoj. Ne ekzistas plu vi, Mateo Timono, ne ekzistas via amiko Dima, mortis via iama religio, alia fariĝis via koro, via animo, fremda estas nun via preĝo... Kaj se levigis via patrino el sia nezoĝigita tombo en la paca arbara tombejo apud Loziŝĉi, ĉi tie en viaj infanoj ŝi ne ekkonos siajn nepojn. Ĉar ili ne estos similaj al vi, nek al via patro, nek al viaj geavoj. Ili estos amerikanoj.“

Mateo vekigis tute kovrita de ŝvitaj kaj sidigis en sia lito.

Li frotis al si la okulojn kaj ne povis rememori, kie li troviĝas. En la ĉambro estis mallume, sed iu paŝadis, iu ronkadis, iu staris super lia lito.

Subite la ĉambro lumigis, ĉar iu ekbruligis per alumeto gasbraketon. La ĉambro lumigis, sed Mateo ankoraŭ sidis, nenion komprenante, kaj ripetadis plena je teruro:

„Ĉiu animo laŭdu Dion!“

„Nu! Kio do estas? Kial vi ekfimis?“ parolis ies konata voĉo. La voĉo ŝajne apartenis al Dima, sed enhavis ion strangan, fremdan. Kaj la viro, staranta super la lito de Mateo, estis ankaŭ Dima, sed Dima fremda, ne simila al Dima... Mateo pensis, ke tio estas sono, kaj

Komentario al tiu interesa diskuto kaj al la tiel favora por nia afero parlamenta decido nur malfortigis ilian efikon. Ni kontentigis per la supra raporto, kiu parolas por si mem, kaj per la ĝojiga fakto, ke la indiferecemaj kaj malamamikemaj, parte eĉ malveraj aŭ sencecaj paroloj de kelkaj parlamentanoj ne povis deteni la pli grandan nombron de la deputitoj de progresema popolo, doni sian voĉon por subvencio al Esperanto.

Pri malprogresemaj opinioj kiel tiu de la sinjoro bankdirektoro Arajärvi, ke „estas damaĝe faciligi eksterlandajn vojaĝojn (!)“ ni povas nur kompate rideti. Simile ja plendis tiu vilaĝano al najbaro pri la fervojo konstruita preter lia vilaĝo, ke ĝi faciligus al lia fiulo la vojaĝon urben, kien jam sufiĉe ofte vojaĝas piede kaj kie li elspezas jam sufiĉe multe da mono!

Al niaj senlaci finnaj samideanoj ni kore gratulas por ilia nova kaj plej grava ĝis nun atingita sukceso. Ke la parlamentoj de aliaj nacioj sekvu la ekzemplon de la finlanda — jen nia deziro!

Deklara Universala Kongreso en Praha Sempa Komunikilo.

Kotizajo. — 25 frankoj oro (antaŭmilita valoro) = 5 dolaroj, 12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝil., skand. kronoj, germ. markoj, 25 frankoj, liroj, dinaroj, drakmoj, leonoj b. r., pesetoj, ĉsl. kronoj, aŭstriaĵ kaj hung. kronoj, polaj kaj finnaj markoj. Geesperantistoj el aliaj ŝtatoj pagas 25 francajn frankojn. Pluaj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizajo. Post la 1. junio alĝis la kotizajo je 50%.

Ĉiu pagas en sia nuna ŝtata valuto. La sumon sendu en rekomendita letero rekte al la ĝenerala sekretario! La ricevo de la kotizo estos venonte sole en ĉi tiu rubriko kvitanota.

Ĝis nun pagis la kotizon la sekvantaj numeroj: 8, 11, 26, 31, 36, 45, 103, 117, 121, 127, 139, 140, 141, 142, 143, 145, 148, 149, 151, 158, 159, 160, 161, 162, 163, 164, 165, 166, 168, 169, 173, 174, 175, 178, 179.

Alĝoj. — 132. S-ro Ganĉev el Sofia, 133. s-ro Balkanyi el Budapest, 134. kaj 135. ges-roj Döring el Freiburg, 136. s-ro Rieck el Greifswald, 137. s-ino van Doorne, 138. s-ino de Boer el Rotterdam, 139. s-ro Maschl, 140. s-ino Maschl el Wien, 141. s-ro Mees el Hago, 142. kaj 143. f-inoj M. N. Silbersteckenovy el Praha, 144. s-ro Popper el Zilina, 145. s-ro Friedrich el Košice, 146. kaj 147. ges-roj Maraury el Huesca, 148. s-ino Büne-man, 149. s-ro Büne-man el Hamburg, 150. s-ro Steiner el Győr, 151. s-ro Schrank el Kempen, 152. s-ro Frankenberger el Bytčice, 153. s-ro Faulhaber el Amsterdam, 154. s-ro Kučera el Rakovník, 155. s-ro Langer, 156. s-ino Langer el Haida, 157. s-ro Ginz el Praha, 158. s-ino Mammen, 159. f-ino Andreasen el Grenaa, 160. s-ro Nosek, 161. s-ro Weinberg, 162. s-ro Pultr el Skrivany, 163. s-ro Camescasse el Paris, 164. kaj 165. s-roj A. O. Janečková el Vitkovice, 166. s-ro Romein el Drumpt, 167. s-ro Pour el Prelouč, 168. oficiala delegito de Esp. Itala Federacio en Milano, 169. s-ro Oulehla el Skrivany, 170. s-ro Kaweckil el Danzig, 171. f-ino Začková, 172. s-ro Zednik el Berlin, 173. s-ro Bittner el Zabreh, 174. s-ro Chal'er el Tarrasa, 175. s-ro Jaroš el Mistek, 176. s-ino Figueres el Alger, 177. f-ino van Doorne el Rotterdam, 178. s-ro Alonso Sanz, 179. s-ino Alonso el Madrid.

li ree per pugnoj frotadis al si la okulojn... Kiam li ilin malfermis, fariĝis en la ĉambro ankoraŭ pli lume, kaj en ĝi are moviĝis homoj, ius enlrintaj. Strangaj homoj, fremdaj, nekompreneblaj, homoj de nekonata rango, kun tiaj vizajoj, laŭ kiuj ne estis eble distingi, ĉu bonaj ili estas, ĉu malbonaj, ĉu ili plaĉas al homo aŭ ne... Ilinvadis la ĉambrom, kiel aro da strangaj fantomoj, vizitantaj homon nur en sono, kaj mallalte, senbrue ili okupadis siajn litojn. Sed Mateo longe ankoraŭ ne povis kompreni, kiaj homoj tio estas, de kie, kion ili ĉi tie faras, pro kio li nun troviĝas inter ili...

Poste li rememoris: ili ja estas amerikanoj. La samaj, kiuj flugas tra la aero, kiuj ridas en preĝejoj, kiuj edziĝas je hebreinoj, kiuj elektas por si laŭplaĉan religion. La samaj, kiuj alproprigas la tutan homon, post kio la religio de homo ankaŭ ŝanĝiĝas...

Sed tiu, kiu staras super lia lito, ĉu li vere estas Dima? Jes, li estas Dima, sed tia, kia povus aperi nur en sono. Dima rapide senvestiĝis, kaj forturmis sian vizaĝon. Tamen Mateo rimarkis, ke lia amiko demetas ne siajn vestojn. Li ne surhavis jam la blankan kitelon, nek la ruĝan zonon, aĉetitan en ilia urbeta ĝuste antaŭ la vojaĝo, nek la grandajn botojn, nek sian larĝan brunkoloran pantalonon. Anstataŭe li nun penadis rapide eligi el la speco de mallonga germana jakto, ne kovranta eĉ tion, kion devas kovri bona vesto; lian kolon kunpremis alta amelia kolumo, la piedoj ne facile eligis el mallarĝa pantalone. Kiam li fine senvestiĝis kaj enrampis sub la litkovrilon de Mateo, tiu ĉi eĉ retirigis, tiom fremda aspektis Dima kun sia ŝanĝiginta vizaĝo. Liaj haroj, nun mallonge tonditaj, staris tute sur la frunto, liaj lipharoj ankaŭ estis mallongigitaj, kaj el lia barbo restis nur mallarĝa amerika ŝovellito.

„Timu Dion, Dima“, diris Mateo, „kiun vi similas, kion vi faris el vi mem?“

Ĝis nun alĝis: el Ĉeĥoslovakio 82, Germanio 23, Nederlando 23, Francio 12, Polio 10, Hispanio 8, Bulgario 5, Aŭstrio 4, Hungario 5, Italio 3, Danio 2, Svisio, Svedio, Danzig, Algerio po 1.

Garantia Fando. — 4. S-ro Döring el Freiburg 100 kĉ., 5. s-ro Brujin el Hago 500 kĉ., 6. s-ro Faulhaber el Amsterdam kaj 7. s-ro van Doorne el Rotterdam po 100 kĉ.

Gesamideanoj, garantiu almenaŭ 100 kĉ.!

Donacoj. — S-ino Mammen el Grenaa kun siaj skoltaj lernantoj ankoraŭ 113 kĉ., s-ro Jung el Horrem 30 kĉ., s-ro Friedrich el Košice 400 kĉ., skolto Larsen el Grenaa 3 kĉ., s-ro Riedl el Jilemnicz 25 kĉ., s-ro Büne-man el Hamburg 8 gmk., s-ro Šimonek el Chicago 1000 kĉ.

Venonte sole ĉi tie oni dankeme kvitanota la donacojn.

Kongresa Kaso. — 62 k. 67 h. enspezo por donacitaj 50 ekzempleroj de la 22-a numero (bildo de Praha) de „*Esperanto Triumfonta*“.

Deponita mono ĉe banko „Bohemia“ en Praha. — 1. f-ino Benkema 200 kĉ., 2. s-ro Krestanoff 41 k. 50 h., 3. s-ro Brujin 2000 kĉ., 4. s-ro Döring 100 kĉ., 5. s-ro Balkanyi 360 kĉ.

Prezoj (hodiaŭaj) en Praha:

I. de la hotelĉambroj.

1. kategorio: a) unuila 10—37 k., b) dua provizora lito 10—20 k., c) duila 25—77 k.

2. kategorio: a) 10—29 k., b) 10 k., c) 26—50 k.

Oni intencas prizorgi ankaŭ loĝadon en privataj familioj kaj komunaj loĝejoj (por neričaj esperantistoj).

Notu viajn ĉirilatejn dezirojn en la de la Loka Kongresa Komitato sendota alĝilo!

II. de la mangajoj:

1. kategorio; a) matenmanĝo (kafo aŭ teo kun butero aŭ kompto, pano aŭ bulko) 10—15 k. — b) tagmanĝo (inter la 12—2 h. posttagmeze) à la carte, buljono, fiŝo aŭ bovaĵo, rostaĵo kun farunbuloj aŭ termpoj, farunaĵo 45—75 k. — c) vespermanĝo à la carte (antaŭmanĝo kaj rostaĵo) 25—65 k.

2. kategorio: a) 5—7 k., b) 33—37 k., c) 25 k. Krom tio trinkmono almenaŭ 10%.

En restoracioj bonaj tag- kaj vespermanĝoj po 10—20 k.

Tre bongustaj kaj malkaraj estas la kolbasetoj, vurstetoj kaj ŝinkoj de Praha. Biero 1/2 kostas 1 k. 30 h. ĝis 2 k. 30 h.

Vojaĝ-Aferoj. — Vidu la vizaran komunikilon! La oka komunikilo alportos prezojn de la biletoj por ĉiuj pligravaj fervojlinioj al Praha.

Glumarkoj oficialaj. — 3 malsamaj specoj dukoloraj ius aperis. 1 peco 10 helerojn, 100 pecoj 9 kĉ. (kun afranko 10 kĉ.), por eksterlando 100 pecoj 3 francajn frankojn aŭ egalvaloran valuton, sendotan en rekomendita letero. Mendu rapide!

Korespondado. — Legu atente la ĝisnunaĵn oficialajn komunikilojn! Ne demandu pri la komunikitaĵoj! Ne malriĉigu la kongresan kuponon forgesante aldoni por respondo aŭ respond-kuponon aŭ afrankon en neuzitaj naciaj poŝmarkoj! Demandu sole pri aferoj rilatantaj al la XIII-a!

Por la Loka Kongresa Komitato:

Augustin Pilnik,
ĝenerala sekretario,
Praha III, Nerudova 40.

Dima videble sin sentis proksimume tiel kiel viro, staranta sen pantalone meze de foirplaco. Li ree deturnis la vizaĝon, kovris la buŝon per la mano kaj parolis per ia kulpa, flatema voĉo:

„Jen vidu, kiel oni min... Kun tiu malbeninda irlandano mi venis en frizejon, por ke oni iomete tondu al mi la harojn. Kredu al mia konscienco, Mateo, mi deziris nur iomete... Sed jen kio okazis! Oni metis min en apogseĝon. Bela apogseĝo, sed kiam oni sidigas en ĝin, finita ĉio! La piedojn tuj io ekkapitis kaj levis, la kapo refalis malantaŭe: je Dio, kvazaŭ virŝafon en buĉejoj oni min... Mi vidas, ke la germano ne taŭge faras, sed moviĝi mi ne povas... Poste en spegulo mi vidas: mi ne estas mi, tute ne estas! — Kion vi faris el mi, vi, hundido? — mi krias. Sed ili ambaŭ estas kontentaj, frapas min sur la ŝultrojn kaj balbutas en sia lingvo: well, very well!“

Dima singardeme moviĝis sub la litkovrilo, penante okupi la plej malgrandan parton ĉe la rando de la lito. Sed, kiam oni estingis la lumon en la ĉambro, kaj kiam enlitiĝis jam la lasta el la amerikanoj, li ankoraŭ unufoje hipokrite ekspiris, poste kuŝiĝis pli komforte kaj diris:

„Sed konfesu, Mateo: tamen, tiamaniere mi pli multe similas amerikano?“

„Kial do vi nepre devas similu amerikano?“ diris Mateo malvarmege.

„Ĉu vi scias?“ vivece daŭrigis Dima, ne aŭskultante lin: „Kiam mi poste ŝange prenis ĉe hebreo en la foiro ĉi tiujn vestojn, — kompreneble kun malgranda alpagoj — tuj sur la strato min aliris sinjoro kaj alparolis angle.“

„Ha, Ivano, Ivano!“ diris Mateo tiel maldolce, ke io kvazaŭ pikis Dima'n, kaj li denove ekmoviĝis. „Berko, kredeble, diras la veron: baldaŭ vi jam forgesos vian religion...“

(Daŭrigo)

Ĉu?

En nia n-ro 18 ni jam elparolis la supozon, ke s-ro de Saussure, alie „Antido“, aŭtoro de la lingvoprojekto „Esperantida“, ekzano de la Esperanta Akademio, forlasis la praktikadon de sia projekto por ree kunlabori kun la esperantistoj. Nun ni ricevis specimenon de nova gazeto „La Vojo“, eldonita de Antido, kaj de cirkulero al la esperantistaro kaj samideanoj, en kiu estas presita „Letero de Antido al la Esperantida Akademio“ kaj „Raporto al la Esperantida Akademio“. Tiu ĉi lasta, subskribita de prof. A. Forel, honora prez., kaj d-ro Ed. Guillaume, prez. de la Esperantida Akademio, tekstas jene:

„Ni havas la honoron komuniki al vi la ĉi-enfermiaran leteron de Antido kaj petas, ke vi donu al ĝi la atenton, kiun ĝi meritas.“

Ni estas en tiu ĉi momento en kritika periodo de la movado por internacia lingvo. Du gravaj faktori okazis lastatempe: 1 la deziresprimado de la Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj en Bruselo; 2 la oficiala prezentado de Esperanto antaŭ la Ligo de Popoloj en Genevo.

Sajnas do oportuna kaj justa, ne semi malfidon kaj dubon pri Esperanto antaŭ la publiko en tiu ĉi momento, kaj oferi nian lingvajn preferojn, almenaŭ provizore, t. e. ĝis la kunveno de la L. d. P. en Genevo je la 1. sept. proksima. Se en tiu kunveno la L. d. P. prenos decidon favoran al Esperanto, tiam ni povos prezenti nian reformpropozicion al kompetenta Komi-iono; kaj, se la L. d. P. prenas nenian decidon aŭ decidon malfavoran, tiam ni povos denove diskuti pri la oportune rekomeni nian publikan propagandon.

Bonvolu do, estimindaj kolegoj, respondi kion eble plej baldaŭ, per jes aŭ ne, ĉu vi akceptas aŭ malakceptas la proponon de Antido.“

Krom tio la cirkulero enhavas mallongan noton, ke „la plimulto de la Akademianoj estis aprobintaj la proponon de Antido.“

— * —
Sed se ni laŭ la ricevitaj dokumentoj eble supozas, ke Antido nun revenis al Esperanto, ni maltrafas. Tralegante „La Vojon“, ni tiu seniluziigos: „La Vojo“ estas gazeto „por evoluigi la internacian lingvon Esperanto en direkto konforma al la bezonoj de scienco, tekniko k. komercmoderna“, ĝi estas „monata organo redaktata en „evoluinta“ Esperanto da Antido“.

Do, nova erar-vojo. Certe, neniu povas riproĉi al Antido fari studojn kaj eksperimentojn pri lingvo internacia kiom ajn; ankaŭ la eldonado de gazeto por preparoli evoluigi aŭ eĉ ŝanĝon de Esperanto ne povas esti krimo (tion proponis ankaŭ Zanoni en ET n-ro 9). Sed ĉu Antido fakte kredas, ke „lia“ lingvo sola jam estas la kvintesenco de lingvo internacia? Ĉu li fakte kredas, ke ne ekzistas la ebleco de pli bona solvo ol „la Esperantida“? Ni opinias, ke tiaj eblecoj ekzistas centoj, eĉ miloj; sed ne unu sola mondo kapablas trovi la finan solvon. La tuta mondo devus kune serĉi por trovi ĝin. Tial ni pledas por enkonduko de Esperanto tia, kia ĝi estas, por ke unue la ideo mem de lingvo internacia triumfu kaj ĝenerale trapanetur. Poste, kiam la tuta mondo jam sciopovas Esperanton, ĝi povos trankvile kaj sendaŭgure priirakti laŭ ĉiuj direktoj la temon de reformoj, ĝis la „kvintesenco“ estos trovita.

Kompreneble ni ĝojas pri la konvinkigo de Antido, ke la praktikado de lia projekto tute ne rezultigis sukcesojn, kaj ke la lingvo Espe-antida, malgraŭ grandaj klopodoj kaj moneteroj, restis nur sur la papero.

Pri la plua evoluo de la aferoj ni povas esti tute trankvilaj. La Ligo de Nacioj en sia venonta kongreso jam faros, kion ĝi trovas bona.

Ni do daŭrigo nian vojon, certe kondukantan al la celo, ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita ĝi estas; kaj se ni tenas niajn okulojn malfermitaj, ni ne povas ĝin maltrafi.

Kroniko.

MÜNSTER (Germ., Vesif.). Komencis du kursoj, la unua gvidata de s-ro postsekr. Schallenberg kun 25 gepostficistoj, la dua gvidata de s-ro Blasing kun 12 partoprenantoj de l' financa oficejo.

DANZIG Danziga Esp. Asocio laboras intense, fervore, bombardante la gazetaron k. a. per novaĵoj el Esperantujo, per cirkuleroj, propagandiloj ktp. Tamen oni ne povas sin deteni riproĉi al la danziganoj trograndigemon. Por la kongreso de Parizo 1914 anoncis sin ne 10000, sed „nur“ 4000 partoprenantoj. La certigo, ke por la en Danzig aranĝota XIV-a Kongreso oni povas kalkuli je 15000—20000 partoprenantoj, estas skrib-eraro; oni opiniis 1500—2000. — Je tiu ĉi loko ni atentigas ankaŭ, ke estas ne bone skribi, ke UEA havas pli ol 10000 anojn (tjon ni legis antaŭ nelonge en anglalingva flugfolio pri „Esperanto, LA Ligo de Nacioj“ kaj en artikolo aperinta en germana gazeto). UEA eble atingos 5000 en tiu ĉi jaro, se ĉiuj anoj de UEA fervore verbos novajn membrojn.

UKMERGE (Lit.). Dank' al propaganda parolado de s-ro Masiliunas la 11. marto malfermiĝis kurso por gimnazianoj. Partoprenas 50 gelnantoj. Kurson gvidas s-roj Masiliunas kaj Giedra. Lernolibroj kaj helpiloj estas senditaj de Kovna Esp. Societo.

TALLINN (Estonio). La Tallinna Estona Lerne-Junulara Ligo aranĝis kursojn de Esp. por siaj anoj; partoprenas preskaŭ 500 personoj, lernantoj de la superaj klasoj de la mezlernejoj.

NARWA (Estonio) Estas fondita Esp. societo. MONTREUX (Svis.). Nia grupo „Lemana Stelo“ ĉiam pliigas. Ankaŭ pliigi la dezirantoj lerni Esperanton. Krom du paralelaj elementaraj kursoj, oni estis devigata aranĝi trian por la plej kapablaj kaj plej rapide komprenantaj lernantoj. — Estas aranĝita Esp. Horo sub gvidado de ĉi-tiea profesoro de muziko, diplomita de Pariza Konservatorio. Nun la grupo klopodas fondi Esp. bibliotekon; sed bedaŭrinde la modesta budĝeto de ĉi unuopa membro ne permesas elspezi monon por la akiro de la Esp. literaturo. Al ĉi sendonta ian esperantaron por la propaganda vespero aranĝota en aprilo ni respondos per bela vidajkartoj de Montreux.

ITALIO. La Ŝtata Ministerio por Maraferejo enkondukis en la R. Institutu Nautici la instruadon nedevigan de Esperanto. — En Venezia d-ro Pizzi gvidas kurson por 100 lernantoj.

BOLOGNA (Italio). Kursoj de 1. jan.: D-ro Masi ĉe „Heraldo Telefona“, Prof. Toschi ĉe kulturklubo „Bononia“, flinĝintaj. — Novaj kaj nun funkciaj: D-ro Masi ĉe Instruista Sindikato (pli ol 100 enskribitoj), Prof. Cochi en ejoj de R. Teknika Instituto (20 o da enskribitoj); parolado de Prof. Toschi pri „lastaj sukcesoj de Esperanto“ kaj vidigo de la koncernaj gazetoj, precipe la n-roj de ET. — Bona akiro estis ing. komandoro Brinis, direktoro de itea „Telefon Herald“, per kiu li promesas regule propagandi.

Esperanto en Polio.

(Raporto de Pola Esp. Servo.)

BYDGOSZCZ-Bromberg (Polio). La 11. febr. komencis nova kurso, regule vizitata de 50 personoj. Gvidanto s-ro Pankratz, red. de „Volkszeitung“. S-ro Ebert gvidas kurson kun 25 junuloj. S-ano prof. Kronenberg eldonis libron kun polaj poeziaĵoj, en kiu troviĝas ankaŭ du belaj Esp. poemoj „Amo“ kaj „Insigno de l' Kristo“.

INOWRACLAW. S-ro prof. Orzech gvidas bone vizitatan kurson Ibgnew Siwinski, aŭskultanto de filozofio, malnova samideano antaŭmilita, perdis la okulojn en la batalo ĉe Verdun. Lin renkontis niaj samideanoj prof. Orzech kaj Kronenberg en Inowracław, kie li ludas fortepianon en kinoteatro „Konkordia“. S-ro Siwinski demandis pri nia movado kaj parolis bonege Esp. kvankam li ĝin ne uzis de tri jaroj. Ĉiulandaj samideanoj estas petataj sendi al li ilustr. poŝtkartojn je la adreso: Ibgnew Siwinski, Inowracław, Kino „Konkordia“ (Polio). Edzino de s-ro S. same bone parolas Esperanton.

CZESTOCHOWA. Esperanto bone progresas. Troviĝas jam 20 membroj de UEA. Kurso kun 50 lernantoj. La konata esperantisto d-ro Thorn parolados baldaŭ pri „Esperanto kaj tuihomara kulturo“.

SIEDLCE. La 4. marto okazis sukcesplena prelego pri „Esperanto kaj ĝia aplikilo en la praktiko“ legita de s-ro Wladyslaw Hirsowski en Instruista Seminario antaŭ pli ol 100 personoj (escepte kelkaj fervoj-oficistoj ĉiuj estontaj instruistoj). Post la prelego s-ro Czeslaw Pruski, del. UEA, faris provan lecionon, kies efiko estis tuj fondiĝo de „Seminaria Esp. Unuiĝo“. Post elmonro de diversaj esp. libroj kaj nun aperantaj gazetoj, f-ino Anna Robryk enskribis 29 personojn. S-ro A. Podgorski, direktoro de la seminario, tre favore rilatas al nia movado kaj solene promesis subteni la organizitan unuigon, samtempe donante la klasejon por lia dispozo.

Tra la Mondo.

La packontrakto inter Ruslando kaj Polio estas subsignita la 19. marto, vespere je 9.30 h. Ankaŭ inter Litovio kaj Latvio estas paco kontraktita, laŭ kiu Litovio havas aliron al la maro en la urbo Polangen, norde de Memel. La plebiscito en Supra Silezio, okazinta la 20. marto, rezultigis grandan plimulton por Germanio. Nur la distriktoj Pless kaj Rybnik montris grandan plimulton por Polio.

GIOLITTI definitive decidis disendi la italan parlamenton. La rebalotado okazos verŝajne en la lasta semajno de la majo.

La 10. marto, ukraina popolo en la tuta mondo festis 60-jaran datrevenon de mortotago de sia genia poeto-profeto (ankaŭ pentristo) Taras Ŝevĉenko. — Aparte, la Antaŭparlamento Ukraina, nomata „Konsilantaro Respublika“, kiu havas nun provizoran sidejon en urbo de Polio (Tarnow), je tiu ĉi tago okazigis solenan parlamentan kunsidon. Tiu ĉi tago estis tago de ukraina tutnacia funebro.

A. K.
La grenetenoj Armour en Ĉikago, la plej modernaj de la mondo, estas detruitaj per brulego. Komence de marto en Montreux estas elektitaj du esperantistoj (membroj de „Lemana Stelo“) kiel deputitoj de la socialistoj en la Landan Konsilantaron de kantono Vo (Vaud), nome la s-roj Alexis Burnens, poŝtoficisto, kaj Lucien Chaboz, fervojoisto.

Sub la nomo „La bela nederlanda libro“ okazos dum la printempa foiro de Frankfurt (10-16. aprilo) ekspozicio de holandaj libroj, organizata de la bibliofila unuigo „Joan Blaas“ en Haga.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun ald. o de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL ITALIO.

Bologna, marto 1921

La monato pasinta inter mia unua kaj la hodiaŭa korespondadoj pli klarigis la lacecon de l' popolo. Dum en Roma la kontraŭstarantoj de ministraro Giolitti dufoje serĉis kunigi siajn fortojn por deĵeti lin de l' registeco, tute malsukcesante kaj montrante nur la fimegon de iliaj deputitaj moŝtoj pro la minaco de proksimaj ĝeneralaj rebalotadoj, la legfarantaj laboroj procedas trankvile, senskue, escepte grandnombro da incidentoj dum la alreĝistar-demanda antaŭperiodo de la kunveno.

Plej grava legprojekto aprobita lastatempe estis elekto de parlamenta komisiono por esplori kaj proponi rimedojn pri la problemoj de la „burokratio“, kies unufianke trodikeco kaj aliflanke malgajaj ekonomiaj kondiĉoj estas ĉe ni, kiel — laŭ mia scio — nuntempe en preskaŭ ĉi nacio.

Unu el la temoj, pri kiuj la kontraŭstarantoj serĉis ataki la ministraron, estis la demando scii ion pri la interkonsentoj „ententaj“ en Londono dum la kunveno mem. S-ro Giolitti rifuzis respondi, ĝis kiam la koncerna ministro, grafo Sforza, ĉeestus en la parlamento. Sed tiu ĉi argumento por atako fundamente estis preteksto: efektive la kontraŭstarantoj mem, krom socialistoj pri rilatoj kun Sovjet-Rusio kaj ŝovinistoj pri Fiume, ne tro interesigis pri la kunveno, „solena“ decidoj de Entento, „solena“ protestoj de Germanio. Ni ne estas fatalistoj, sed fundamente nia popolo per sia komunsago, same kun sia ĉefministro, sentas, ke historio konas siajn vojojn kaj ilin trakuros, vole-nevole de l' viroj, tiel diritaj eminentuloj.

Antaŭ kaj kondiĉe por mondpacigo oportunas sinpacigo, laborado, ŝparemo. Jen post post lom filatio eniras ĉiuj vojoj. La lastatempaj okazintaĵoj en FIRENZE (preskatireblo de popola kvartalo, konfliktoj kc.) ne malpravigas ĉiun aseron, ĉir — dum la plej aĉaj partoj de l' populama o e s. plodigis sian violentemon — la ĉefuloj mem de l' partioj ekstremaĵoj klopodis por retrankviliĝo de l' urbo. Certe restas iom da ekscitaco en la lando, tion pravas la oftaj konfliktoj inter „faskistoj“ kaj socialistoj, kaj pro tio la projektiĝa „alvoko al la popolo“ per nova ĝenerala rebalotado ŝanĝas prokrastinda, kaj de kelkaj tagoj fies problebleco perdis, kiel oni diras, multajn vepunktojn.

Umberlo Toschi.

Filatelio.

(Poŝtmarkajn novaĵojn sendu al E. Fethke, Oppeln, Supra Silezio, Ring 11. Ĉiu informanto ricevos 4 diversajn plebiscit-sileziajn pm.)

ARGENTINIO. Je memoro de ĝeneralo Justo José de Urquiza aperis 1 pm. de 5 cent. kun lia portreto. — Okaze de centjara datreveno de la morto de ĝeneralo Belgrano aperis serio de 5 pm.: 2 centavo ruĝa (matizolo), 5 cent. ruĝe-blua („Kreo de la nacia flago“), 12 cent. verde-blua (Portreto de Belgrano).

ĈEĤOSLOVAKIO. Pm. por la Ruĝa Kruco: 40 plus 20 hel. olivkolora, 60 plus 20 helverde, 125 plus 25 blua. — Kolorŝanĝo: 5 hel. malhele violkolora, 20 hel. orankolora.

DANZIG. Aperis du provizoraj pm.: 60 pig. sur 30 pig.-pm. (blua surpriso), 80 pig. sur 50 pig.-pm. (ruĝa surpriso). — Je memoro de la Danziga konstitucio estis eldonata serio de pm. kun ilustraĵo de Danziga „Kogge“ (ŝipo), 10 valoroj, 5 pig. ĝis 10 mk.

ESTONIO. Du valoroj: 1 mk. ruĝa, 2 mk. malhelblua.

ITALIO. Du valoroj: 55 malhele violkolora, 85 brunruĝa.

JUGOSLAVIO. Aperis unu sama serio por la tuta lando de 14 valoroj parte kun portreto de la reĝo, parte de la reĝido.

LIECHTENSTEIN. Kaŭze de la aligo de la Liechtensteina poŝto al la svisa aperis ĝis nun 5 valoroj: 5 r. orankolora, 5 r. olivkolora, 7½ blua, 10 flavverde, 15 malhel siringviol.

MEMEL-TERRITORIO. Ruĝa surpriso 5 mk. sur 2 franka franca pm. 25 mk. sur 5 franka pm.

MEZA LITOVIO. En la de ĝeneralo Zeligovski okupita parto de Litovio oni aperigis post kelkaj provizoraj eldonoj du seriojn de pm. Unue 5 valoroj montrantaj la polan kaj litovan naciain insignojn je 25 fen., 1 mk. kaj 2 mk. Due 6 valoroj montrantaj partie scenojn el la litova historio (25 fen. ĝis 10 mk.).

POLIO. Pro manko je 3 markaj pm. estis surprezata la 40 fen. pm. per 5 mk. En malgranda formato aperis 2, 3 kaj 5 mk.

PORTUGALIO. 5 novaj valoroj: 6 c. ruĝe siringviol, 12 c. grizblua, 15½ c. helblua.

SAAR-TERRITORIO. Nigra surpriso: 20 sur 75 pig. Surprezo 5 mk. kaj 10 mk. kun la Saarancia nacia insigno sur 15 pig. pm.

SUPRA SILEZIO. Oni intencas eldoni la vo d-nada figuro novan belantan poŝtmark-serion.

SVISIO. Kaŭze de plialtigo de la sendkostoj estis eldonataj provizoraj pm. Surprezo 2½ sur 5, 5 sur 7½, 10 sur 15, 20 sur 15. Krom tio la nunaj pm. aperas alikolore: 10 c. verde, 20 c. helviolkolora, 40 c. blua.

Mil Abonantoj.

ET nun havas 1052 pagantajn kaj 83 regulajn ne pagantajn abonantojn, krom la ekzempleroj prove menditaj por opa vendado en kioskoj (pli ol 500, el kiuj espereble restos minimume 50). De la kvar lastaj numeroj ni presis po 1600—1800 ekzempleroj.

Laŭ landoj la abonantaro dividiĝas jene: Germanio 565, Hungario 100, Britio 75 (Anglio 66, Skotlando 4, Irlando 5), Estonio 55, Polio 50, Svedio kaj Aŭstrio po 46, Rumanio 40, Hispanio 34, Ĉeĥoslovakio 35, Litovio 51, Finnlando 29, Francio 29, Brazilio 24, Nederlando 22, Italio kaj Svisio po 18, Usono 17, Norvegio 14, Portugalio 15, Bulgario 11, Japanio 9, Argentino kaj Danzig po 6, Belgio kaj Kuba po 5, Ruslando, Turkio kaj Kanado po 4, Islando 2, Latvio, Jugoslavio, Georgio, Palestino, Meksikio kaj Aŭstralio po 1.

Supren al la dua milo!

Parolejo.

63.

Gazeto kaj ĵurnalo.

Oni skribas pri „gazetoj“ kaj „ĵurnaloj“; sed al mi ŝajnas, ke oni neniel diferencigas unu de alia. Opiniante, ke krom mi ekzistas ankoraŭ aliaj, kiuj ne havas klaran imagon pri tio, per kio gazeto diferencas de ĵurnalo, mi petas lingvistojn klarigi ĉi tiun aferon. (Tallin'ano.)

64.

Respondo al 63.

Preskaŭ ĉiuj esperantistoj intermiksas la tri esprimojn: gazeto, ĵurnalo kaj revuo. Sed pri tiuj ĉi tri korporetoj mi havis ĉiam tre klaran percepton. „Gazeto“ estas laŭ mi ĉiu ajn periode aperanta folio (ni ja ankaŭ parolas ĉiam pri „gazetaro“, sed ne pri „ĵurnalaro“ aŭ „revuaro“); „ĵurnalo“ estas ĝenerale gazeto, kiu komunikas aktualajn novaĵojn, kaj plej ofte korespondas al grandformata ĉiutaga ĵurnalo (la vorto „ĵur“ — france „jour“, itale „giorno“ — jam enhavas la kompreneblan „tago“); „revuo“, kio signifas „revizio“, „retroirigardo“, „prikrilitiko“, estas laŭ mia percepto gazeto, kiu aperas ne tiel ofte (ĝenerale monate) kaj je malpli reklama sed des pli nobla aspekto, kaj kiu donas resumon de la okazintoj de certa periodo. Tial mi donis al ET la titolon „ĵurnalo“, kaj la aliajn Esp. gazetojn mi titolas per „revuo“. (T. J.)

65.

Demando.

ET n-ro 20, „Napolo“, 2-a alineo: Kiel oni komprenu „tera rando, denuntita de la Sirenoj?“ Ĉu tera rando = mallarĝa strio de la tero? (L. F.)

66.

Rilatas al Parolo 55.

La opinio de s-ro Minor pri fumi (intransitiva) kaj fumigi (transitiva) ŝajnas ĝusta al mi, kvankam mi ĝis nun per legis fumi (trans.) kaj fumigi (intrans.). (Vidu ekz. Christaller, vortaro Germ.-Esp.)
Pli ol „nazi“ mi ŝatus „nazizi“ tabakon, kio estas pli klara kaj logika. Sed ankaŭ „prizi“ ŝajnas ne mallaŭdinda, ĉar ĝi estas sufiĉe internacia kaj oni eble eĉ ne bezonas apudmeti la vorton tabako. (L. F.)

67.

Kolorilo.

La materio de koloro estas nomata kolorilo. Ĉu tio estas vera kaj logika? La sufikso -ilo signifas ja ian rimedon, laborilon, per kies helpo oni procedas ian laboron. Sed materio de koloro ne estas ja la helpa rimedo por kolorado, sed materialo mem. Sed por signifo de materio ekzistas sufikso -aj. Kiel oni ne uzas ĝin por kolor-materio? (J. W.)

Recenzojo.

LIBROJ.

DICTIONNAIRE COMPLET ESPERANTO-FRANÇAIS. (Plena Vortaro Esp.-Franca.) De prof. Grosjean-Maupin. Dua eldono. Parizo 1921. Esperantista Centra Librotejo, 81, rue de Clichy. Formato 10-16 cm, XX kaj 242 pĝ. Prezo 6 fr.

La dua eldono de tiu ĉi praktike aranĝita kaj plaĉe bindita vortaro sufiĉe diferencas de la unua eldono. Ĝi estas zorge reviziita, korektita kaj kompletigita kaj enhavas krom ĉiuj oficialaj radkioj multajn ne-oficialajn radkiojn, ĉe kiuj la verkinto notis precize la referencojn. La vortaro estas rekomendinda al ĉiuj, ankaŭ ne-francoj, kiuj scipovas la francan lingvon.
ESP. ALFABETO EN BRAJLA SKRIBO. Postkarto eldonita de Blindula Esp. Grupo Frankfurt a. M., Adlerflichstr. 8. La profilo el la vendado de tiu ĉi interesa postkarto estas por ebligi la eldonon de germ.-Esp. vortaro por blinduloj.

POEZIE. De Leopold Kronenberg. Bydgoszcz (Polio) 1921. Eldonejo de „Nowe Tory“. 11½/16 cm, 64 pĝ. broŝur. Prezo 90 pol. mk., afrank. 100 pol. mk.

Enhavas piejgrandparte polajn poemojn, sed ankaŭ kelkajn en la lingvoj esperanta, germana kaj latina.

GAZETOJ.

ESPERANTISTA MOVADO. Kronstadt (Ruslando). Prosp. de Lenin 30, sept., okt.—nov. kaj dec. 1920, kaj ESPERO, Petrogrado, Fontanka 17, ĝi, 5, aŭg. kaj nov. 1920.

Tiuj ĉi rusaj gazetoj enhavas multe da interesaj sciigoj pri la Esp. movado en Ruslando en la lasta tempo. Ili estas pruvo, ke Esperanto en la Sovjeta Respubliko tute ne perelis, sed bone progresas, malgraŭ multaj malhelpoj.

ESPERANTO. Marto. La ĉefartikoloj (alvoko de E. Privat k. c.) estas direktitaj al la adreso de la neesperantistaj mondlingvanoj, forlasas provizore ian specialan formon de lingvo internacia kaj apogi sole Esperanton por plirapidigi la enkondukiĝon de nia idealo. S-ano Privat ankaŭ opinias utila studrevuon por teoria diskutado pri internacilingvaj demandoj. (Komparu ET n-ro 9, kiun ni ankoraŭ povas liveri al intereso.)

ESPERO KATOLIKA. Marto. Kun intereso (speciale por katolikoj) enhavo. Interale eldono de episkopoj pri lka kaj pri la Graz'a Kongreso.

INFORMOJ DE Danziga Esperanto-Asocio. Marto. Hektografita 4-paĝa folio. Komunikas, ke la asocio nun havas 300 membrojn. Ni rimarkas, ke la asocio ŝanĝis eian nomon de „Danziĝa“ (!) al „Danziga“ — laŭ nia opinio ĝi bone faris per tio.

LA ESPERANTISTO. Wien. Jan.—febr. Duobla numero (4-paĝa, grandformata) kun tre leginda enhavo.

EUGENIA. Marto. Barcelona (Hispa.). Pasaje Santa Eulalia 5. Ilustr. kultura revuo favora al Esperanto.

U. S. L.

Sportistoj de la tuta mondo unuĝu.

Je la fino de 1920 estas fondita, sub la nomo de Universala Sport-Ligo, ilgo celanta: Organizi Sportistan Internacion, plimultigi kaj plifaciligi rilatojn inter ĉiulandaj sportistoj. U. S. L. celas ankaŭ krei sportistan literaturon, servi kiel peranto ĉe la internaciaj rilatoj de la sportistaj organizaĵoj, diskonigi kaj disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto ĉe la sportistaj rondoj. U. S. L. serĉas reprezentantojn en ĉiuj urboj. U. S. L. invitas esp. grupojn vigle propagandi Esperanton ĉe la sportistaj organizaĵoj, eble malfermante kursojn por sportistoj. Membro de U. S. L. devas fariĝi ĉiu sportisto, sportistino aŭ sportista organizo, kiu akceptas la celojn de U. S. L. Jara kotizo estas du svisaj frankoj. (Por landoj de la centra eŭropa kron-sistemo la kotizo estas 15 kronoj.) Aliĝu direkte ĉe la sekretario-kasisto s-ro Stefano Pedrazzini en Locarno (Svisujo).

Por la Centra Komitato de U. S. L.:
Angelo De Mast. Stef. Pedrazzini.

3a Internacia Specimena Foiro en Padova (Italio)



1.—15. Junio 1921.

Unua foiro en Italio en neprovizoraj konstruaĵoj (24 000 m²) kaj tute kovritaj trairejoj, en propra kvartalo de 160 000 m².



Ĉiulandaj komercistoj egalkondiĉe akceptataj.
Ĉiuj industrioj allasataj.

Senpagaj Esperantaj presajoj kaj ĉiuj informoj pri partoprenado, vizitado kaj organizado haveblaj ĉe Ufficio Informazioni della

3-a Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italia).

Anoncetoj.

ITALA LINGVO. La gesamideanoj dizirantaj helpojn en la lernado de l itala lingvo, skribu al Luigi Puppo, via del Bragone 1-3, Genova-Sturla, Italujo. Li certe respondos. SAKSOFOŬOJ. — C. Carter, 115 Morley Av., N. 22, London, deziras aĉeti. Sendu katalogon kaj prezojn. ĈEĤOSLOVAĴOJ ATENTU! Studento E. Fethke, Oppeln, Ring 11, Supra Silezio, konante la polan lingvon, deziras elerni per korespondado kun ĉeĥoslovako aŭ -ino la ĉeĥan lingvon kaj laŭ deziro rekomence instruos la polan lingvon. Li intencas partopreni la XIII-an ESP. GAZETOJN intersanĝas, postmarkan kolekton je favoraj prezoj proponas kaj siajn verkojn „La Bulgara Lando kaj Popolo“ kaj „El la proksima Oriento“ (ambaŭ kun tri koloraj etnogr. kartoj) por 30 gmk. vendas: Ivan Krestanoff, Karlovo (Bulg.).

DESEGNO-PAPERO. Johano Toman, Budapeŝt IX, Gat-u. 25, 1-3, petas universitatajn studentojn sendi al li iutullajn desegno-paperojn; ĉar en Hungario tiuj nur karege estas riceveblaj. Ĉiun sendon li tuj rekomencos per esperantaj.

SPORTO. Etigeno Mayer, Budapeŝt VII, Dob-u. 36, fsz. 5, deziras korespondi precipe kun sportistoj kiuj intersanĝas atletikajn postkartojn ilustr. Certe respondas. SENDU TUJ vian adreson aŭ anoncon por 3-a eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj!“ Postulu senpagan prospekton! — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI: Kiu sendos al mi 20—25 nesamaj postmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da nutempaj litovaj kaj malnovaj rusaj (de la cara tempo). Hans Nehrning. Post. Zeimelis, Melguza dvaras. Litovio.

12—14jaraj geinanoj deziras korespondi kun geinanoj el ĉiuj landoj. Skribu al Hans Heinrich, Plauen (Germ.), Moritzstr. 76.

S-ro Imre Kalman, oficisto, Szechenyi u. 45, Miskolc (Hungario) deziras korespondi per postkarto ilustr. kaj lertrojo pri kiu ajn temo kun francoj, belĝaj kaj precipe kun angaj kaj amerikaj gesamideanoj; ĉiam respondas. Othmar Cellato, Sparbersbach, 3-II, Graz (Siriio), deziras korespondi per postkarto kaj lertrojo.

Ladislao Szilasi, Budapeŝt V, Podmanicki-u. 75, deziras korespondi kun junuloj instruataj, muzikemaj.

S-ro Schwartz Benő, Budapeŝt VII, Garay-tér 16-II-10, deziras korespondi letere pri pacifismo, socialaj demandoj kaj koncernaj interrilatoj kun ĉiuj landoj.

S-ro Wasserburger Bela, Szombathely (Hungario), Erzsebet kiralyne u. 37, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

S-ro Ladislao Hölzel, Budapeŝt VII, Garay-tér 15-I-12, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Matyas Kirchnopf, Budapeŝt X, Sörgyar-u. 8202, deziras korespondi per postkarto ilustr., intersanĝi stilojn kaj gazetojn.

F-ino Margareto Toman, Budapeŝt IX, Gat-u. 25-I-8, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideaninoj.

Mi vendas hungarajn postmarkojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapeŝt VII, Wesselényi str. 30.

Antal Szállási, Budapeŝt V, Uljpesti rakpart 2, Varosi har, lernanto, intersanĝas postkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Emilo Klamert, Budapeŝt VIII, Prater str. 46-I-8, deziras intersanĝi papermonon, insingnojn, postkartojn ilustr., lertrojn, postmarkojn, kaj Esp. gazetojn.

Erich Gleis, Breslau 15 (Germ.), Goethestr. 67, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per postkarto ilustr. kaj intersanĝi postmarkojn.

S-ro L. Naray, Kispes (Hungario), Kossuth-Lajos-u. 30, deziras korespondi pri socialismo kaj laborista movado, per postkarto ilustr. kaj lertrojo.

S-ro Ernst Kloppenburg, Hagen-Deistern (Westf., Germ.) deziras korespondadon kun samideanoj en ĉiuj landoj. Tuj respondas.

J. Major deziras korespondi kun angollingvanoj Esperante kaj angle. Budapeŝt IX, Remete str. 36-II-4.

Emeriko Strasser deziras interkorespondadon kun ĉiulandaj fervolitoj-laboristoj. Budapeŝt IX, Remete str. 36-II-8.

Kiu volas korespondadi kun hungaraj, ferlaboristoj, skribu al: Ferlaborista Esperanto Grupo, Budapeŝt VII, Thököly-u. 66.

Hungara Junulo

19-jara, kiu faros matur-ekzamenon ĉe komerca lernejo en tri monatoj, ŝatus trovi oficon eksterlande. Iom parolas (kaj komerce korespondas) turke, germane, france krom Esp. kaj hungara lingvoj. Prefere vojaĝus Svision, Francion, Holandon, Germanion, Svedion aŭ Hispanion. — Ne tiom la salajro estas konsiderata ol la ebleco je spert-akiro.

Mi tre petas la samideanojn, kiuj bonvolus min helpi, skribu viajn afablajn liniojn al tiu ĉi adreso:

Mihael V., Budapeŝt VIII, Nemet-u. 36-II-13.

= Firmoj =

kiuj havas intereson por germanaj komercaĵoj (egale de kia branĉo) kaj kiuj serĉas interrilaton kun germanaj firmoj, sin turnu al
Karl Puffst, Plauen i. Vogtl.
Schliessfach 154.
Importo. General-Agentejo. Eksporto.

Kantoj en Esperanto

la plej konataj germanaj popolkantoj
kaj
originalaj Esperantaj kantoj
sur apartaj folioj.

Presitaj per grandaj, facile legeblaj literoj, kun laŭvorta germana traduko aŭ retraduko kaj kun klarigo pri la elparolado (por ne-esperantistoj aŭ komencantoj).

Ĉiu kunkantas!

Interese, amuzige, instrue.

Oportunaj kaj plej taŭgaj por sola kaj amasa kantado dum Esp. festoj, ekskursoj ktp.

Prilaboritaj kaj eldonitaj de

Emil Kirchner, Ehemnitz (Germ.)
Charlottenstr. 5.

Ĝis nun estas 5 kantoj heveblaj:

1. La Himno, 2. Fratoj, gajon ĝuu ni!, 3. Papo kaj sultano,
4. La tilio, 5. Anjo de Tharau.

— Prezo po folio 50 pfg. —

Je grandkvanta mendo grava moderiĝo.

Internacia Foiro de Breslau

Printempa Foiro

5-a ĝis 8-a Aprilo 1921

Teksajoj, vestaĵoj, ornam- kaj bijuteri-komercaĵoj, or- kaj argentajoj, armetio, mastrumadartikloj, mebloj, ludiloj, papero kaj paperaĵoj, nutraĵoj, drogoj kaj kemiaj produktajoj.

Informojn donas

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

Esperanto-fako

Breslau I, Ohlauerstr. 87.